

BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

n-ro 5/1986

novembro 1986

RESTU FLANKE ĈE NI

Al Jiří Kořínek por vojaĝo en futuran tempon

Via domo estas abeluj' kiu de versoj plenas
Muzik-murmuro de poemoj futuraj aŭdeblas
Vi poeto estas Ne akvo senspure
en sablo malaperanta

Vi sunas en regionoj de Esperanto-literaturo
Restu flanke ĉe ni Sen vi
la vinbereg' de la poezi' dezertus
Sen vi senfrukta
estus l' kamp'

Multas ankoraŭ paĝoj kie neskribitaĵoj restas
Ne nur unu libro via ankoraŭ eldoniĝi devas
Restu kun ni Jen jam printempas jaro
Birdoj alflugadas
Laboron necesas fini
Pli frue foriri oni ne povas

Ni esperantistoj marŝas
en landon de pli profunda humanec'
De tie venas malhelpoj kaj pezo
Diru al vi: Mi devas vivi
Multon ankoraŭ fari

Ne vi ne estas nurnura prujno
sur florojn dumfroste vane falanta
Por arboj de Esperanto-literaturo
vi estas riĉe verda branĉar'
Kaj al branĉoj bonguste matura
kaj ege sukoza frukto

Prago, fino de septembro 1986 Jiří Karen

Nia ŝatata poeto Jiří Kořínek ĝisvivis 80 jarojn la 1-an de oktobro. Kelkajn tagojn antaŭ sia naskiĝtago li grave malsaniĝis kaj oni enhospitaligis lin. Bonŝance nun jam lia sanstato pliboniĝas. Ni deziras al li baldaŭan resaniĝon kaj ankoraŭ multajn jarojn de bona kaj feliĉa vivo kaj de sukcesplena laboro por nia Esperanto-kulturo.

Ho, kia malfeliĉo esti ĉiam pura!

Mi libertempis en mia ĉarma bonfartejo, en unu el la plej pitoreskaj banlokoj – Karlovy Vary. Ŝajnas al mi, ke oni ĝin tiele konstruis: Unue oni faris kaveton, ĉirkaŭis ĝin per krutaj arbaraj deklivoj kaj tiujn oni kelketage "priplantis" per fabelaj kasteletoj. Ĉiu kasteleto originalas, tamen ĉiuj similas al edziĝfesta torto kun kremo. Ne vane iu ie titolis la urbeton "Freneza sonĝo de sukerajisto". En la urbeto tie kaj ĉi tie fontas kuraciga mineralakvo, trafluas ĝin rivereto Teplá /Varma/, en kiu vivas la plej dorlotataj fiŝoj, ne plu manĝantaj bulkojn, nur fromaĝon. En tiu ĉi loko oni fakte povas nenion alian fari, ol bonfarti, ĉar multaj fakuloj diversmaniere zorgas pri ĉies sano, banante, masaĝante onin aŭ volvante la malsanajn partojn de la korpo en parafinon aŭ kuractorfon. Aliajn oni kuracas per plej modernaj aparatoj, sed ĉio ĉi estas nur aldono al la plej grava – ĝusta dieto kaj regula trinkado de la kuracakvo. Ankaŭ la trifoja ĉiutaga marŝado al diversaj fontoj ne estas venĝo aŭ malico de kuracistoj, ĉar la pacientoj devas vole nevole moviĝadi. La urbaj teatro, galerio, koncertejo, ankaŭ diversaj ekspozicioj, ekskursoj, kinoj kaj promenejaj koncertoj kompletigas la sukcesan iom-post-ioman resaniĝadon de alvenintoj el multaj landoj kaj diversaj kontinentoj. Homoj promenantaj en parkoj kaj ĉirkaŭ la fontoj aspektas tre kontentaj. La vetero favoras, ĉio floras, bonodoras.

Tamen mi subite ŝokiĝis vidante grupon da infanoj, tenantaj pokaletojn, irantaj trinki al la fonto. Malrapide kun malgajaj mienoj kaj lacaj okuloj. Ho, ĉu mi ne sonĝas? Ĉi tie, en mia bonfartejo, tiom da tristo? Mi tuj ne kuraĝis alparoli la infanojn, ĉar akompanis ilin flegistinoj. Sed mi kredis elpensi ion por almenaŭ ridetigi kelkajn el ili. Kaj mi ne devis longe atendi. Promenante en arbaro mi trovis ilin sidantajn sur benkoj en tre bela loko – arbara ludejo. Mi tuj ĉesidis kaj alparolis du knabojn verŝajne 12-jarajn. Ili feliĉaj, havante aŭskultanton, tuj impete akuzis, plendis kontraŭ la fato, flegistinoj, fontoj, banloko, kontraŭ ĉio. Unu el la duopo havis stomakulceron, la dua travivis flavmalsanon. Jen iliaj plendoj-akuzoj:

"Ĉiutage, imagu, ĉiutage ni devas manĝi legomojn kaj fruktojn. Sinjorino, ĉu vi entute povas imagi, manĝi ĉiutage legomojn? Kaj la mineralakvo, kia ĝi aĉa." Je mia respondo, ke mi ĝin ŝate trinkas, ili konsideris, ke mi certe trinkas de alia fonto. Ĉar la ilia ŝprucigas akvon kun gusto de sapo. "Nu provu, sinjorino, gustumu ĝin, vi spertos, kia ĝi aĉa." (Por nesciantoj mi mencias, ke la akvo de ĉiuj 12 fontoj en Karlovy Vary havas la saman guston, nur la temperaturo malsamas.) Sed ne nur la manĝaĵo kaj akvo estis por la infanoj fia. Ili daŭrigis: "Kaj la promenoj estas ĉiam en la sama arbarloko, kia enuo!" Kaj nun venis la atuto. Unu el la knaboj montris al mi la randon de sia pantalonotubo vokante: "Sinjorino, ĉu vi vidas, kia pura estas mia pantalone?" Mi tuj ne komprenis, kion mi bedaŭru, male, mi ĉiam ĝojis pro la pureco de stratoj kaj vojoj. Sed li daŭrigis: "Terure pura estas mia pantalone kaj imagu, ke mi ĝin surhavas jam kelkajn tagojn. Hejme, ho hejme mi devas ĝin ĉiutage ŝanĝi. Kaj ĉi tie, eĉ ne unu makuleto. Ni ne rajtas kuri, grimpi, ludi laŭ nia gusto. Tiaj malbonaj flegistinoj nin gardas. Ni ĉiam devas nur promeni, sidi, kia enuo!"

"Knaboj", mi respondis, "ja viaj malsanoj ne permesas ankoraŭ sporti, kuri ktp. Eltenu, post ioma tempo ĉio estos en ordo." Ke la aĉaj akvo, legomoj, promenoj, ĉio estas nura hejmsopiro mi ne klarigis al ili. Ni nur interkonsentis, kiamaniere mi donos al ili freŝajn kajerojn kun krucenigmoj kaj ŝercoj.

Iliajn lastajn vortojn "Ĉu iu povas elteni resti ĉiam nur pura?!" mi ne respondis, ĉar mi devis zorgegi, ke miaj okuloj restu sekaj.

H. Štruncová

Vulpoj en la urbocentro de Bruselo

Vulpo, unu el la plej timemaj, libere vivantaj mamuloj, ekloĝiĝas nuntempe ĝis ĉe la pordegoj de malnova Bruselo. Dume en pasintaj jaroj rimarkis fakuloj aperon de la rustkoloraj vilbestoj en arbarparkoj de "urborandaj kvartaloj, hodiaŭ oni kalkulis minimume 30 vulpkuŝejojn en la dense loĝataj lokoj ĉirkaŭ la historia centro de Bruselo.

Vulpoj nutras sin nun ne nur per etaj ronĝuloj, sed ankaŭ per trovitaĵoj el restaĵuloj kaj traserĉitaj rubaĵoj. Ilian surprizan adaptecon al civilizacio atestas la fakto, ke unu vulpo enmondigis 6 idojn en la tubaro de malproksimhejtado, proksime de loĝdomoj. Kelkaj pluaj familioj enloĝiĝis en ĝardenoj de bruselaj familiaj dometoj.

La fakuloj trankviligas la loĝantaron de la belga metropolo, ke dume la urbaj vulpoj, kontraŭe al iliaj "vilaĝaj parencoj" ne estis eĉ en unu kazo malsanaj je danĝera rabio.

Laŭ ĈTK esperantigis H. Š.

Eli Urbanová

K o n f e s o

Ne, mi ne havas multajn sciojn;
jen kion mi neglektis,
dum febre mi kolektis
impresojn, emociojn.

Ne, ne penetris mi pli funde
en ian fakon gravan,
nur en revregnon ravan;
meditis mi profunde.

Ne, fanfaroni mi ne povas
per saĝo de kleruloj;
en certaj du okuloj ĉion,
min mem mi trovas.

Nia strato
En nia strat' nek eta mov'.
nek sensacie freŝa nov'.
Perifera avenu'
tro muta pro enu'.

Dubinde, ke nur je ornam'
en la fenestro blanka mam'
gigante gapas el muslin'
de fama klaĉulin'.

Sed kion sekvas la spion'?'
Aŭskultas ŝi: kun monoton'
ree kaj ree maĉas man'
kantaĉon sur pian'.

Tramarŝas knaboj – migra trib'.
Aperis io... Jen surskrib'
ŝokanta per la freŝa nov':
Leganto estas bov' –

R o z o

Rozo strange rava
en ĝardeno kreskis:
Kiun ajn mi pensis,
ĝi fermita restis.

Jen vin unusolan
mi nur rememoris –
kaj en la ĝardeno
rozo tuj ekfloris.

(El "Verso kaj larmo")

Jaroslav Hašek

P s i k i a t r i a m i s t e r o

Estis proksimume la dua horo nokte, kiam sinjoro Hurych estis revenanta el kunveno de abstinenculoj, okazinta en iu restoracio en Malgranda Urbo. La kunveno daŭris tiom longe pro tio, ke oni pritraktis rezignon de la prezidanto, kiu estis implikita en malbelan aferon. Nome estis pruvita lia kulpo, ke en iu restoracio li fortrinkis glason da pilzena biero. Kiel honesta viro li ekŝiĝis.

Sinjoro Hurych do iris hejmen sur la Karola ponto. Li iris kun feliĉiga konscio, ke li laboras por la bono de la homaro. En sia stomako li ja dume sentis la malvarmon de sodakvo, iom pli alte, tie batis varma, arda filantopa koro, kiu preskaŭ grasiĝus, se kuracisto ne malpermesus al li trinki bieron. Tial li duonjaron estis abstinenculo, decideme li ĵetis sin en batalon kontraŭ alkoholo, li fariĝis sekretario de societo de abstinenculoj, abonis al "Interesoj tuthomaraj", lernis Esperanton kaj manĝis legomojn.

Liajn meditojn interrompis ekkrio sur la rivero. Ĝi verŝajne estis unu el tiuj ekkrioj dum nokto, kiujn ŝatas junaj poetoj kaj kiuj alportas al ili profiton de 16 heleroj, ĉar tiom oni pagas por unu linio kun ekkrio, mistera nekonata, fluanta de la rivero en la nokta silento.

Sinjoro Hurych klinis sin trans la balustradon de la ponto kaj ekvokis al la supro de Vultavo, estante plena de prema antaŭseno: "Ĉu vi deziras ion?" Neniun pli saĝan ideon li ekhavis en la momento, kiam lia filantropa koro kliniĝis de sur la ponto.

En tiu momento, kiam sinjoro Hurych esploreme rigardis malsupren en la akvon, paŝis sur la ponto en la direkto al Malgranda Urbo frizisto Bílek.

Li estis sinjoro, kiu ja ne estis abstinenculo, precipe tiutage, sed kiu havis nemalpli noblan koron, entuziasmigitan de vera amo al la proksimumo, kiel sinjoro Hurych, koron oran kaj ofereman.

Rapidrigarde li rekonis, ke sinjoro Hurych kliniĝas suspektinde de sur la ponto. Sinjoro Bílek estis rapidagama viro. Senbrue kiel kato li link-rapide de malantaŭe proksimiĝis al sinjoro Hurych, kaptis lin je la manoj kaj provis fiksi lin al la tero. Sed sinjoro Hurych ne hezitis, kaptis la nekonatan viron je la kolo kaj vokante "Patrol!" ambaŭ noblaj viroj luktis kune, dum la frizisto kriis: "Trankviliĝu, kial vi malesperas?"

Polica patrolo venis ĉi tien trote, kaj sinjoro Bílek, per ĉiuj fortoj tenante sinjoron Hurych en la brakoj, renkonte vokis al ĝi spirmanke: "Sinjoroj, tiu ĉi sinjoro volis salti en la riveron kaj mi savis lin!"

Sinjoron Hurych kaptis nun kvar pli spertaj manoj, prenis lin subbrake kaj unu el la policianoj per patra voĉo komencis al sinjoro Hurych malkonsili sinmortigajn ideojn.

Sinjoro Hurych, surprizita de tiu situacio, kriis kiel dum atakoj de histerio: "Estas miskompreno, sinjoroj!"

Post tio li ekridis strange, afekte kaj ripetis: "Vi eraras, sinjoroj, mi efektive ne saltis en la

riveron!"

La nobla frizisto iris malantaŭe kaj interrompis lin: "Mi jam kelkfoje savis la vivon al homoj, kiam ili volis salti en riveron, sed neniun ankoraŭ tiom furioze defendis sin, kiel vi. Estas klare, ke vi estas terure ekscitita. Vi ja disŝiris mian veŝton."

Poste admonis sinjoron Hurych la alia policano: "Mia Dio, kial oni devus preni sian vivon pro ĉiu bagatelaĵo! Ĉio estos ree pli bona! Estu la motivo de via ekscitiĝo kia ajn, ĉio denove reboniĝos. Kaj vi vidos, post kiam vi matene resobriĝos, ke la mondo tamen estas bela."

"La mondo estas belega," parolis al sinjoro Hurych la policano ĉe la dekstra flanko, "se ĉiu, al kiu enkapiĝas ia ideaĉo, volus salti en akvon, tiam devus droni ĉiu dua homo."

Sinjoro Bílek dum tio tiris sinjoron Hurych je la mantelo kaj emfazeme aldonis: "Por ke vi sciu, kiu savis vian vivon, rememoru, post kiam vi resobriĝos, ke mia nomo estas Bílek kaj mi estas frizisto en Smíchov."

Sinjoro Hurych komencis denove histerie voki: "Mi petas vin, sinjoroj, lasu min! mi ja nenion intencis, mi nur kliniĝis trans la barilon, ĉar ŝajnis al mi, ke malsupre sur la rivero iu vokas."

"Mi petas vin," refutis tion la frizisto, "ĉu vi ne volis salti? Mi havas, sinjoro, spertojn. Kiam mi ekrigardas iun, mi scias tuj, ĉu li volas salti aŭ ne. Sinjoro, se vi ne volus salti, vi ne defendus vin tiom furioze. Kiam vi matene rememoros pri tio, danku al Dio, ke la gardanĝelo sendis min al vi survojen."

Sinjoro Hurych jam senpacientiĝis, turnis sin malantaŭen kaj ĵetis al la nobla kaj oferema viro en la vizaĝon kelkajn krudajn ofendojn.

Sinjoro Bílek per afliktita voĉo komencis klarigi al la policanoj: "Tion oni ricevas por sia boneco! Kiam tiu ĉi sinjoro matene resobriĝos, li ekhontos pro tio, kiel li repagas al sia savinto."

Sinjoro Hurych faris provon ĵeti sin sur la friziston, sed li ĉesis, kiam la policanoj diris al li, ke ili venigus arestveturilon.

Proksime de la polica direkto li provis lastafoje klarigi la situacion kaj diris: "Ĉu vi ne kredas min? Mi juras al vi, ke estis hazardo."

"Nur trankviliĝu," kvietigis lin la policanoj, "post kiam vi satdormos, kiam ĉio elvaporiĝos el via kapo, vi tute alimaniere rigardos la vivon."

"Pro Jezuo Kristo," ekveis sinjoro Hurych.

II.

Ekzistas tuta vico da psikaj malsanoj, kiuj estas akompanataj per provoj pri memmortigo, kiel ekzemple la progresiva paralizo, paranojo, melankolio, diversaj specoj de manioj, histerioj kaj psikozoj.

Policaj kuracistoj, venigitaj al savitaj sinmurdistoj, uzas demandan sistemon kiel plej gravan psikiatrian helpilon. La respondoj, kiujn la savitaj sinmurdistoj diras, estas orientilo por la kuracisto por konstati la specon de la psika malsano, kiuj ĉiam estas akompanataj per konfuzo de konceptoj kaj imagoj.

Ankaŭ en tiu ĉi kazo estis venigita polica kuracisto, por esplori la psikan staton de sinjoro Hurych.

Sed antaŭ ol li venis, la deĵoranta ĉefĝendarmo demand-ekzamenis la ofereman friziston kaj verkis kun li protokolon.

Ankaŭ li ne detenis sin por ne serenigi al sinjoro Hurych la malgajan humoron per aludo de plezurego, kiun la mondo donas.

"Ĉio estos denove bona, sinjoro, ĉio reakordiĝos, eĉ se kaŭzis tion malfeliĉa amo. Tio solviĝos. Oni ja diras: Por unu floro la suno ne lumas! Post kiam vi matene resobriĝos, vi iros danki al sinjoro Bílek, ke li savis vian vivon. Kaj se kaŭzis tion familiaj malharmonioj, forloĝiĝu, ne prenu tion tiom serioze. Kaj se kaŭzis tion eble financaj malfacilaĵoj, mi ja ne povas koni viajn cirkonstancojn, jen honesta homo povas vivteni sin. Laboro nobligas la homon!"

Kaj kion al tio respondis sinjoro Hurych? Kovrante sian vizaĝon per la manoj li vokis:

"Pro Jezuo Kristo, mi ja ne volis tion fari!"

Poste denove sinjoro Bílek parolis al li: "Mi estas frizisto Bílek el Smíchov, al mi vi povas konfesi, kio igis vin fari tion."
Sinjoro Hurych ekploris.

III.

Venis la polica kuracisto kaj diris: "Alkonduku la esploraton!"
Ili alkondukis sinjoron Hurych. Lia vizaĝo estis terurita, lipoj palaj, hararo taŭzita.
"Kial vi volis salti en la riveron?"
"Mi ĵuras, ke mi ne volis!"
"Ne malkonfesu, pruvas tion sinjoro Bílek kaj ankaŭ la sinjoroj ĝendarmoj. Kiam li estis savanta vian vivon, vi furioze defendis vin."
"Estas terure!" eklamentis sinjoro Hurych.
"Diru al mi, kial la suno subiras?"
"Pro Dio mi petas vin, sinjoro doktoro!"
"Ĉu vi konas iuj liberajn ŝtatojn en Azio?"
"Mi petas vin, sinjoro doktoro!"
"Kiom estas sesoble dek du?"
Sed tiam sinjoro Hurych ne plu detenis sin, kaj anstataŭ diri "sepdek du", li maldelikate kapofrapis la polican kuraciston.
Matene ili forveturigis lin en frenezulejon, kie li estas flegata jam unu jaron kaj duonon, ĉar kuracistoj ĝis nun ne trovis ĉe li konscion de psika malsano, kio laŭ psikiatrio estas signo de la psika stato.

Trad. J.Patera

(Malgranda Urbo, Smíchov – kvartaloj de Prago, sur Vultavo /ankaŭ Moldavo/ – rivero en Prago)

La programe de kunvenoj de la klubo en novembro kaj decembro 1986:

3. 11. 1986 Per Esperanto tra Balkano I. (diapozitivaj)	– Šperling
10. 11. 1986 Rememoro pri Rudolf Hromada	– Seemannová
17. 11. 1986 Per Esperanto tra Balkano II. (diapozitivaj)	– Šperling
24. 11. 1986 Trarigardo de la Esperanta gazetaro	– Štruncová
1. 12. 1986 Kantas Yoëlle Rabu (magnetofono)	– Němeček
8. 12. 1986 Angla vespero	– Howard
15. 12. 1986 Z a m e n h o f - v e s p e r o	– Mařík, Patera
22. 12. 1986 Kristnaska vespero	– Štruncová
	– Patera
29. 12. 1986 Trarigardo de la Esperanta gazetaro	– Štruncová
5. 1. 1987 La jubilea jaro 1987	– Patera

La kunvenoj okazas ĉiulunde de la 18.30 ĝis la 20.30 h en la klubejo en Malinová-str. n-ro 25 en Zahradní Město (Ĝardena Urbo).

S-anino Kubová donacis al nia klubo 50 kronojn. Ni kore dankas.

La 6-an de oktobro okazis solena vespero en nia klubo honore al niaj tri elstaraj E-poetoj: la 1-an de oktobro ĝisvivis 80 jarojn la konata poeto Jiří Kořínek, la 2-an de oktobro estus ĝisvivinta 80 jarojn d-ro Tomáš Pumpr, eminenta tradukisto kaj esperantologo, kaj la 9-an de oktobro 80-jariĝis Pavel Rosa, eksprezidanto de SEA, la ĉefa kolono de la slovaka E-movado, aŭtoro de lernolibro, de multaj

tradukoj kaj ankaŭ de la televida kurso de Esperanto (elsendita en 1974). La vesperon preparis s-ano Jar. Mařík. Oni i.a. prezenti la poemon de Jiří Karen honore al Jiří Kořínek (vidu sur la 1-a paĝo de tiu ĉi bulteno.

La 29-an de septembro vizitis nian klubon la elstara E-verkisto kaj tradukisto el Brno s-ano Josef Vondroušek. Tiu kluba vespero estis unu el la plej belaj de la lasta tempo.

Radio Praha elsendis okaze de 80 jaroj de la poeto Jiří Kořínek (la elsendo estis la 2-an de oktobro) rimarkindan duonhoran intervjuon kun li kaj lia bofilo, docento D-ro Vlastimil Novobilský, Csc., "Ambasadoroj de nia kulturo rakontas pri sia granda amo". Versoj en E. de la Nobel-premiito Jaroslav Seifert ekvivalente redonitaj de Kořínek substrekis la enhavon de la titolo. – La 16-an de oktobro doc. Novobilský raportis en Radio Praha pri Esperanto kiel pontlingvo ĉe maŝina tradukado (la nederlanda projekto).

La 17-an de oktobro okazis en Radiopalác en Praha prezentado de poetoj verkantaj en E. por neesperantista publiko. La vesperon preparis la Literatura sekcio de ĈEA kaj oni prezentis la originalajn poetojn J. Kořínek, Ĉ. Vidman kaj J. Rumler kaj la ĉeĥan poetinon Markéta Procházková, kies esperantigita poemaro ĵus aperis en Brazilo (trad. de J. Kořínek).

ESPERANTISTA KLUBO EN JABLONEC N. N. invitas nin sabate, la 6-an de decembro, al la tradicia "Nikolaa Vespero" kun internacia partopreno. Dum gaja vespero kun muziko kaj danco oni aranĝos ankaŭ "tombolon de solidareco". La Nikolaa vespero okazis en la nova kultura centro KaSS, str. U balvanu 2 (sub la stacidomo ĈSA). Turisma tranoktejo aŭ hotelaj ĉambroj estos certigitaj, sed skribu rapide al.: ESPERANTO, p.př. 190, 466 21 Jablonec n.N.

Okaze de la 20-a datreveno de ilia E-klubo oni aranĝos publikan LETERVESPERON. Sendu salutkartojn kaj propagandmaterialojn por ilia ekspozicio. Ĉiuj estos rekompencitaj. La adreso estas sama kiel supre. – Sabate la 18-an de aprilo 1987 okazos jubilea XV-a Printempa Pacmarŝo kun internacia partopreno. Detalajn informojn oni sciigos ĝustatempe.

BULTENO de Klubo de Esperantistoj en Praha (loka grupo de ĈEA), p.k. 1069,
111 21 Praha 1. Redaktas: Kultura komisiono ĉe la komitato de la Klubo de Esperantistoj en Praha.